

Ora Ĵurnalo

Numero 4, Februaro 2018

Al la tuta mondo:

*Bonvenon al la **verda** Gotenburgo !*



Bonvolu viziti nian retpaĝon:

www.esperanto-gbg.org



Espe-Porko – ĉiam en Ora Ĵurnalo!

Espe-Porko dankas al ĉiuj, kiuj aliĝis kiel membroj en la Ora Klubo! Estas loko por pliaj: Membriĝu, pagante po 100 SEK jare al la Esperanto-Societo de Gotenburgo al



pg 4 36 12 – 1. Bv skribi: Membro de Ora Klubo 2018.

Dank' al viaj pagoj ni ja aĉetis malhumigilon. Per ĝi la libroj fartas bone en la 15 kv-metra kela lokalo en la iama ICA-nutraĵvendejo en Stannum.

Kiam mi skribas jenon, mi rigardas la veterraporton pri Gotenburgo (31 januaro). La grado de humideco de la aero estas 93 %, pluvo 99 %. vento 5 m/s.

La printempo logas nin. /Siv

Dirite pri la tria numero de Ora Ĵurnalo

- ValOra kontribuo! (el Fejsbuko) – (Dankon, ni ŝatas vortludojn!)
- 19 aproboj (likes) en Fejsbuko !!!
- Ĉu Esperantujo ekzistas (paĝo 3)? Ĉu oni uzu tian vorton? (Kial ne?)
- (De la e-klubo en Älvsbyn:) Kia eksterordinara revuo, kiun vi havas en Gotenburgo. (Dankon, vi inspiras nin plu-iri.)

En la redakcio estas Ingegerd Granat, Siv Burell – kiuj respondecas pri la enhavo – kaj Andreas Nordström – kiu respondecas pri la paĝarango, kontrolas la lingvon kaj laŭbezone kompletigas la paĝspacojn per anekdotoj.

Vi povas kontakti nin per nia hejmpaĝo – www.esperanto-gbg.org.

Aprila kursaro en la franca E-kastelo Gresillon → la 1a aliĝperiodo baldaŭ finiĝos

Karaj amikoj!

De la 20a ĝis 28a de aprilo 2018 okazos la 8-a staĝo PRINTEMPaS kun proksimume 40 partoprenantoj.

- Kurso A1–A2 gvidata de Marion Quenut (Tuluzo)
- Kurso A2–B1 gvidata de Christophe Chazarein (Tuluzo)
- Kurso B1–B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg)
- Internaciaj KER-Ekzamenoj (27-28 aprilo)
- Prelegoj kun Nijole Stakeniene (Litovujo)
- Bona etoso kaj bonaj manĝoj (viando aŭ vegetare)



Informoj: gresillon.org/printempas

Aliĝo: gresillon.org/aligho

Posta programo: gresillon.org/agendo

Somera programo: gresillon.org/somero

Ĝis baldaŭ en la franca Esperanto-kastelo
Greziljono!

Jannick Huet – kastelo@gresillon.org

NB: la redukto de 10 % validas ĝis la **20a de februaro 2018**.

Enhavo de Ora Ĵurnalo n-ro 4 2018

Paĝo

2. Espe-Porko – ĉiam en Ora Ĵurnalo!
Dirite pri la tria numero de Ora Ĵurnalo.
Aprila kursaro en la franca E-kastelo
Gresillon → la 1a aliĝperiodo baldaŭ finiĝos.
3. La enhavtabelo.
4. Societo por demokratio.
La oficiala tago de la memoro pri la naziisma neniigo.
5. Pliaj klopodoj krei Fredens Hus (La domo de la Paco).
Filmfestivalo en Gotenburgo.
6. Internacia Tago de la Gepatra Lingvo 21 februaro.
La plej popularaj nomoj de novnaskitaj beboj en Svedio.
7. Ständigt aktuell fråga: Var används esperanto mest?
Monica Eissing: Mia hobio – legado.
8. Interrete troviĝas multo! – sugestoj de Inga Johansson.
Dialogo kun dioj – temo por la Ora Klubo-kunveno 15 januaro ĉe Siv en Gråbo.
9. Dialogo kun dioj:
Dioniso.
Zeŭso.
10. Dialogo kun dioj – Pozidono.
Unu dio pli – Hadeso.
11. Esperantosabato en Gotenburgo, la 3an de februaro 2018:
Bo Sandelin prelegis pri Adam Smith, "la patro de ekonomiko".
12. Siv renkontis: Evert Svensson – vivo kun idealoj.
13. Anekdotoj (el 1904).
14. Det var bättre förr – eller? / Pli bone en malnovaj tempoj – aŭ?
15. El la biblioteko de Stannum:
Lingvomanio, proverboj kaj idiomoj de 28 lingvoj en Eŭropo, daŭrigo.
16. Lingvokompreno en Eŭropo: la nova lingvo *Europanto*.
Mer tips från Inga.
17. Aktuell person – George Soros.
18. Rubekolo, apoganto de Jesuo – pri unu el niaj arbaraj birdoj. De Ingegerd Granat.
KRESKO, nova esperantogazeto el Kroatio.
19. Afrikaj aktivuloj:
Joel Muhire.
Augustin Kakozwa.
20. Intervjuo kun Martin Strid post la fama misdiro.
23. Pliaj anekdotoj (el 1904).
24. Folke Wedlin: Ture Sventon i Warszawa (fortsättning).
27. Ludu kune! Ŝtono – Tondilo – Sako.



Societo por demokratio

La oficiala tago de la memoro pri la naziisma neniigo okazis en la Gotenburga universitato la 26-an de januaro 2018.



Fakte oni kutime celebras ĝin la 27an de januaro, sed tiu tago estis sabato en 2018, kaj tial oni elektis la 27-an de januaro.

La aŭlo estis plena de homoj el ĉiuj specoj.

Laŭ la Biblio Galatoj 3:28: *Ne estas ja judo nek greko, ne estas sklavo nek liberulo, ne estas ja viro aŭ virino...* Ĉiuj estas de la sama valoro.

Göran Rosenberg, kies gepatroj transvivis la naziisman neniigon, parolis pri la malboneco de la tempo. Li ankaŭ akcentis la grandan gardemon, kiu estas bezonata por defendi la demokration.



La lernejo de Hvitfeldtska en Gotenburgo partoprenis per juneca ĥoro, kiu donis agrablan koncerton sub la dirigento Martin Bagge.



Niki Vaghti esploris pri "Civitana kuraĝo de labortago". "Kial vi ne intervenas kiam iu estas maljuste traktata?" ŝi demandis. (Vidu "Vardagens Civilkurage" interrete!)

Filmita renkonto kun Sigmund Baum, kiu transvivis la naziisman neniigon. Monica Hirsch faris la intervjuon. Ŝi laboras pri la projekto "Vivanta Historio".



Por la lasta fojo Sigmund Baum rakontis al ŝi kial li kaj lia patro transvivis en "Auschwitz-Birkenau" kaj en kvin aliaj koncentrejoj.

Legu lian historion en la libro "Neniam forgesu" kaj vidu la filmon!

La guberniestro de VGR [La regiono de Okcidenta Gotio], Anders Danielsson, finis la tagon per memori pri la kruelaj krimoj, kiuj okazis dum la dua mondmilito.



Neniam denove!



La ĥoro de Hvitfeldtska

Pliaj klopodoj krei Fredens Hus (La domo de la Paco)

La 18an de januaro estis nova kunsido de pac-organizoj. Kompreneble la Esperanto-Societo de Gotenburgo estis reprezentita. Celo: Havigi domon por Fredens Hus – la Domo de la Paco.

Karin Utas Carlsson de *Fredsam* gvidis la diskuton:

Kie troviĝas loko por kunsido de 60 – 100 personoj? Fredsam ja kunorganizas multajn organizojn por demokratio, virinaj rajtoj, helporganizoj, pacorganizoj k.t.p. Ĉu pli bone havi malmultekostan lokon en konfliktregiono en la suburbo, aŭ multekostan lokon en la centro de Gotenburgo?

En la suburboj oni eble povus akiri lokon en Hjällbo aŭ Hammarkullen. Partoj de la biblioteko en Kortedala translokiĝos kaj postlasas lokon. En Kviberg ankaŭ eblas. Interese, se la iama milita areo donus lokon al Pacdomo!

Ni esperantistoj kompreneble favorus Esperantoplatsen se eble estos sufiĉe da loko



La Viktoria-domo kun la Haga kinejo.

en la sama domo kie nun estas la lingvokafejo. La domo situas centre en la urbo, proksime al placo Järntorget. Pri lokoj en Guldheden oni ankaŭ diskutis.

La Viktoria domo ankaŭ eblas, ĉar tie ja jam estas

Fredsam. Kaj en la

proksimeco ĉiam estas gejunuloj survoje al la Haga-kinejo. Tamen la domo estas tre malnova kaj la ĉambroj estas malvarmaj.

Kiel provizoran estraron ni elektis Karin Utas Carlsson, Jante Holmberg kaj Sylvia Lidén Nordlund. Al la venonta kunsido – 6 februaro je 18h en la Viktoria-domo – ili prezentos proponon pri statutoj kaj ni fondos societon kun la nomo "Fredens Hus i Göteborg".

Estis diskuto ĉu la diversaj organizoj aliĝu kiel "tuta asocio" aŭ ĉu la membroj individue aliĝu.

Eble respondo la venontan fojon.



Filmfestivalo en Gotenburgo

Jen la katalogo kun filmoj el 78 landoj

Kiam vi legas la februaran numeron de Ora Ĵurnalo, la festivalo estos finita, sed ĝi revenos ĉiun jaron.

En Svedio ni ne alilingvigas la dialogojn en filmoj, sed havas subtekstojn en la sveda – aŭ en la angla.

La plejparto de la eksterlandaj filmoj havas anglan tekston.

Okazas ke homoj venas al Gotenburgo por vidi multajn filmojn, matene, posttagmeze, vespere, nokte. La filmoj kostas malpli ol en la cetera jaro kaj estas videblaj en multaj

lokoj dise en la urbo. Tamen, oni devas aboni frue por havi biletojn al la plej interesaj filmoj.

Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

estas internacia tago celebrata 21-an de februaro.

Unesko en novembro 1999 deklaris la 21-an de februaro Internacia Tago de la Gepatra Lingvo de 2000. La celo de la tago estas konservi la lingvomultecon kaj kulturmultecon.

La elekton de la dato motivis eventoj de la 21-a de februaro 1952 en Dako (tiam orienta Pakistano, nun Bangladeŝo), kie la polico mortigis homojn, kiuj manifestaciis por la Movado por bengala lingvo.

En 2008 estis la tago kiam Unesko lanĉis sian organizaĵon por la Internacia Jaro de Lingvoj.

UNO diris en sia retejo pri la Tago de la Gepatra Lingvo:

"Lingvoj estas la plej potencaj iloj por konservi kaj evoluigi nian palpeblan kaj nepalpeblan heredaĵojn. Ĉiuj movoj por



antaŭenigi la dissemadon de la patrina lingvo servos ne nur kuraĝigi lingvan diversecon kaj plurlingvan edukadon sed ankaŭ evoluigi plenan konscion de lingvaj kaj kulturaj tradicioj tra la mondo kaj por inspiri solidarecon bazitan sur komprenado, tolerado kaj dialogo."

El Vikipedio

La plej popularaj nomoj de novnaskitaj beboj en Svedio estas nun



por knabinoj: Alice, Alicia, Olivia, Ella, Ebba, Lilly, Astrid, Saga, Freja kaj Wilma;

por knaboj: William, Oscar, Liam, Lucas, Oliver, Alexander, Elias, Hugo, Noah kaj Adam.

(Hmmm... mia sesjara nepo nomiĝas Adam kaj mia katino Alicia. /Siv)

Ständigt aktuell fråga: Var används esperanto mest?

Ofta får man frågan var används esperanto mest. Man kan ju se på statistik för att besvara denna fråga.

Just nu ser jag en flaggkarta från länken **Neniam milito inter ni**. Den innehåller aktuella nyheter på esperanto och där anges från vilka länder de kommer, som laddar hem dessa nyheter till sin dator. Länder, där man




mest laddar ner nyheter på esperanto är i dag (den 9 februari 2018 – flest kommer först:)

**USA, Frankrike, Brasilien
Spanien, Tyskland, Polen
Italien, Japan, Canada
Ryssland, Ungern, Belgien
Nederländerna, Storbritannien, Argentina
Sverige, Österrike, Mexiko**
osv.

Anmärkningsvärt är att Kina inte finns med, dock finns många esperantister i Kina, men de kommer nog inte åt denna länk:

<http://neniammilitointerni.over-blog.com>

inga j



Mia hobia – legado

Monica Eissing skribas:

Mia hobia estas legi librojn. Estas kiel veni en alian Mondon por mi. Oni sentas kompaton por karakteroj kun siaj problemoj kaj akompanas ilin ĝis la fino. Estas facile esti engaĝita pri la pensado de homoj. Oni povas imagi kiel ili aspektas kaj same pri la medio.

Estas kiel oni revas for de ĉiutaga vivo, kiam oni venas en la libron kun tia intenseco. La libro devas esti streĉe interesa por influi al mi.



Mi ŝatas amon, historion kaj krimon kaj librojn, kiuj estas engaĝantaj.

Korajn salutojn de *Monica*

Mi (Siv) aldonas: Oni diras ke la plejparto de knaboj/junuloj ne ŝatas legi – kaj ke la plejparto de knabinoj/junulinoj ŝatas legi. En vendejoj la libroj, kiuj turnas sin al knabinoj plias ol tiuj kiuj turnas sin al knaboj. Ĉu tiu manko estus kaŭzo de la diferenco? Kion vi pensas? Sed en la aŭtobuso matene pli da viroj ol virinoj legas la gazeton, ĉu ne?

Mi ja povas konstati ke Andreas Nordström legis multe pliajn esperantajn librojn ol mi.

Kiam ni estis ordigantaj la bibliotekajn librojn laŭ la alfabeto sinsekvo, li diris: "Tiun ĉi mi legis, kaj tiun kaj tiun" k.t.p. Hmmm, mi nun komprenas kial la esperanta nivelo de Andreas estas tiel alta. Mi estas envia!

Mi demandas al vi karaj legantoj: Kiu esperantlingva libro estas via plej ŝatata? Bv skribi mallonge pri ĝi kaj ni enmetos viajn elektojn en venontan numeron de Ora Ĵurnalo. / Siv

Interrete troviĝas multo!


Interrete Inga Johansson trovis sugeston al interesa ligilo por ĉiuj "**libro-amantoj**":

<https://laesperantistochefenestro.wordpress.com>

"Ĉi tiuj sugestoj estis skribitaj en 2015 de Paulo Silas. Bedaŭrinde li forpasis en oktobro 2017", Inga skribis. Vi ankaŭ ĉi tie trovos multajn aliajn interesajn ligilojn pri esperanto.

Ankoraŭ unu ligilo por vi, kiu volas gvidon al esperantaj tekstoj: Temas pri Olga Kerziouk, bibliotekistino laborante por British Library. Ŝi ofte informas pri Esperanto-libroj kaj verkistoj. Jen kelka historia materialo:

www.bl.uk/reshelp/findhelplang/esperanto/esperantocollections/esperantocols.html



Se vi emas **informi al gejunuloj** pri esperanto kaj preferas filmetojn – legu la jenon kun subteksto en la angla:

Esperanto: Like a Native – YouTube :

www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI

Dialogo kun dioj – temo por la Ora Klubo-kunveno 15 januaro ĉe Siv en Gråbo



Ingegerd havis kartojn kun diaj nomoj kaj ni hazarde prenis la jenajn: Dionizo, Zeŭso kaj Pozidono. Krome ni aldonis Hadeson.

Ĉu vi – kreativaj legantoj – volus kompletigi la diaron per viaj kontribuoj? Bonvenon!

Sekvas niaj diaj dialogoj:



Dioniso

Dioniso estas la Dio de la vino, la festoj kaj la fluo de forto de la vivo.

Ni: Bonvenon al Gråbo, Dioniso! Kion vi volas rakonti pri Grekujo?

Dioniso: Estas varma vetero tie. Ĉi tie en Gråbo estas nur nuboj kaj pluvo. Mi memoras foje en Grekujo kiam la reĝo aranĝis festojn. Tiam ni estis tre ebriaj.

Ni: En Gråbo oni antaŭe laboris multe por abstinenco. Troviĝis societo nomita Blå bandet – La blua bendo. Tiu multe laboris kontraŭ uzo de alkoholo.

Dioniso: Kompatindaj Gråbo-anoj, ĉu ili eĉ ne trinkas vinon semajnfine?

Ni: Ĉiuj ne ŝatis la vorton "lagom", ili drinkis tro. Troviĝas aliaj trinkaĵoj, kiuj estas bongustaj, ekz. kafo, limonado, ĉokolado ktp.

Dioniso: Kie oni povas aĉeti vinon en Gråbo?

Zeŭso

Zeŭso estas la superreĝo de la Dioj de Greklando. La bildo de Zeŭso montras fortan, grandan viron kun densa barbo. Li ankaŭ regas super la Universo. Li loĝis sur la monto de Olimpo.

Studanto: Ĉu vere vi estas tiel bona kiel vi mem diras?

Zeŭso: Mi estis en la sama lernejo kiel Ŝivao, Kriŝno kaj Zaratuŝtro...

Studanto: Kiu estas via edzino?

Ni: Vi devas iri al Lerum, kie troviĝas la alkoholaĵa vendejo Systembolaget.

Dioniso: Ĉu oni ne povas aĉeti vinon en ordinara nutraĵvendejo?

Ni: Ne.

Dioniso: Kial?

Ni: Pro zorgo pri la junularo.

Dioniso: En Grekujo oni havis festojn por honori min. La gejunuloj trinkis vinon kaj dancis kaj kantis kaj muzikis. Kaj kiam ili ebriiĝis, ili ekdormis. Sen mi la festoj estus malamuzaj.

Ni: Alkoholo povas detrui familiojn.

Dioniso: Se oni ne toleras vinon, trinku ion alian. En Romo estis eĉ pli sovaĝaj festoj, ĉar tie regis Bakĥo.

Ni: Eble viaj festoj estis pli trankvilaj.

Dioniso: Jes. Do mi venos al Gråbo por la somermeza festo!

Ni: Vi estos bonvena!

Zeŭso: Unu el ili nomiĝas Hera, alia estas Persefona.

Studanto: Ĉu vi ankaŭ havas infanojn?

Zeŭso: Jes, mi havas multajn infanojn. La plej konataj estas Afrodita kaj Dioniso.

Studanto: Kiam vi ĉesis esti dio?

Zeŭso: Kiam la apostolo Paŭlo venis al la Areopago en Ateno kaj rakontis pri la Nekonata Dio.



Pozidono



Tiu greka dio regas super la mondajn marojn kaj riverojn. Li ankaŭ regas super la tertremadoj. Tri objektoj oni kombinas kun

Pozidono, nome: tridento, ĉevalo kaj fiŝoj.

– La maroj muĝu, ĉevaloj galopu kaj fiŝoj vivu por la esperanta movado!

Parolo inter sinjoro Pozidono kaj esperantostudento:

Studento: Ĉu vi pensas ke la fiŝoj povos transvivi en la maro?

Pozidono: Mi, la reĝo de maro, volas purigi la tutan maron for de toksoj kaj ŝipvrakoj.

Unu dio pli – Hadeso



Orfeo kaj Eŭridica – nun opero en scenejo "Röda Sten", Gotenburgo. Tiu versio estas (tro?) moderna. La fino de la opero estas pli feliĉa – Orfeo revidos Eŭridican en iuspeca supera ekzisto. 12 kantistoj kaj 20 muzikistoj kunagas.

Jen ĉi-sube la tradicia versio:

Orfeo kaj la nimfo Eŭridica amis unu la alian. Ili geedziĝis kaj vivis feliĉe dum longa tempo.

Sed la paŝtisto Aristaios ankaŭ sopiregis ŝin. Foje li ekvidis Eŭridican en la arbaro, kaj kuregis al ŝi. Ŝi fuĝis kaj sukcesis sin forsavi de li. Sed ŝi fariĝis tre laca kaj kuŝiĝis sur la teron. Ŝi ne rimarkis la serpenton ĉe sia piedo. La serpento ekmordis. Estis ege venena serpento kaj post kelkaj minutoj Eŭridica mortis.

Studento: Kiom da marvirinetoj estas en la maro?

Pozidono: Tro malmultaj kaj malgrandaj!

Studento: Pro kio vi havas tridenton?

Pozidono: Mi kaptas fiŝojn, speciale soleojn.

Studento: Kara sinjoro Pozidono, kion vi pensas pri la homoj?

Pozidono: Ili nur ruinigas la maron, kiu estas plena de plastaj portsakoj, vrakoj, kadavroj, medicinoj kaj kemiaĵoj.

Studento: Ĉu vi ne pensas ion bonan pri la homoj?

Poseidon: Ne, mi preferas marvirinetojn!

Orfeo atendis longe, fariĝis maltrankvila kaj sendis siajn servistojn serĉi ŝin. Finfine ili trovis ŝin kaj portis ŝin al Orfeo. Li fariĝis nekonsolebla. Li decidis venigi ŝin el la Subtera Mondo. Orfeo iris al la Subtera Mondo kun sia liro.

La regantoj de la Subtera Mondo nomiĝas Hadeso kaj Persefona. Ili fariĝis tuŝitaj de la sonoj de la liro, kaj promesis redoni Eŭridican al li. Sed ili metis kondiĉon. Li ne rajtas turni sin kaj rigardi Eŭridican dum la promeno tra la tunelo supren al la tero.

Eŭridica sekvis lin, kaj ili proksimiĝis al la surfaco de la tero. Tiam ŝajnis al Orfeo ke li ne plu aŭdis la paŝojn de Eŭridica. Li turnis sin kaj provis preni la manon de Eŭridica.

Sed li ne atingis ĝin. Eŭridica rapide malaperis reen en la Subteran Mondon – por ĉiam!



Esperantosabato en Gotenburgo, la 3an de februaro 2018

Oni ĝojas kiam esperantistoj, kiujn oni delonge ne renkontis, venas al la esperantoklubo. Bo kaj Anne-Marie Sandelin venis hodiaŭ. Bo Sandelin prelegis pri **Adam Smith, "la patro de ekonomiko"**. Bo estas senjora profesoro de la Komerca Akademio de Gotenburgo. Li skribis multajn librojn, ĉefe pri ekonomiko, sed li ankaŭ interesiĝas pri esperanto. Antaŭ kelkaj jaroj aperis svede lia libro pri Adam Smith, skota ekonomikisto kaj filozofo, kiu ankaŭ pritraktis la lingvoproblemojn de sia tempo, la 18an jarcento. La libro Adam Smith estos baldaŭ eldonita en esperanto. Praktike, ke la sama persono kaj verkas kaj tradukas la saman libron.



La Ondo havis artikolon pri la libro en 2011:

La Ondo de Esperanto. 2011, №4–5 (198–199).
<http://esperanto-ondo.ru/Diverse/198smith.htm>

En la 3a ĉapitro Bo pritraktas la konsiderojn de Adam Smith pri la unua formado de lingvoj.

Kial Adam Smith interesiĝis pri lingvoj? Bo mencias du kialojn: 1) La lingvo estas socia markilo. La skota dialekto donis malaltan prestiĝon. 2) Erudicia eŭropano devas mastri plurajn lingvojn.

Bedaŭrinde Adam Smith ne povis paroli Esperanton, kiu ankoraŭ ne ekzistis (mia komento). Li malŝatis kiam francaj vortoj "forpuŝis" la anglajn. Oni devas zorge varti la anglan lingvon! (Komparu kun la nuna sveda debato, temanta pri anglaj vortoj, kiuj forpuŝas la svedajn).



Adam Smith interesiĝis pri la ordo en kiu la vortklasoj aperis ĉe la prahomoj. (Nun mi citas rekte el la lumbildoj de Bo) :

Paŝoj en la evoluo de la homa lingvo (laŭ Smith):

1. Nepersonaj verboj kiel *pluit*, pluvas.
2. *Venit* povus signifi la tutan okazaĵon, kiam leono venas.
3. Pli malfrue en la evoluo de la lingvo, *venit* ne indikis, ke ĝuste leono venas. Aldona vorto estas necesa.
4. Ekzemple *venit ursus*, urso venas, aŭ *venit lupus*, lupo venas.

La substantivo: Se renkontiĝas du sovaĝuloj, kiuj neniam lernis paroli kaj kiuj elkreskis en malsamaj lokoj, ili bezonas iel komunikiĝi. Ili tiam eligas certajn sonojn, kiam ili volas indiki individuajn objektojn, ekzemple certan kavernon, certan arbon aŭ certan fonton.

Kune kun la verboj oni bezonas substantivojn: Laŭ Smith certa substantivo unue signifas ion individuan, sed poste estas pli vaste uzata por similaj aferoj.

Por diferencigi inter individuaj objektoj ekstaris adjektivoj kaj prepozicioj. La vortoj "verda arbo, ekzemple, povus servi por distingi certan arbon de aliaj, kiuj estis velkintaj aŭ sensukiĝintaj".

Jen la resumo de Bo pri Adam Smith, tre intereza sciencisto el la epoko de la klerismo:

Ĝeneralaj konkludoj pri la scienca sinteno de Smith:

1. La sciencaj interesoj de Smith estis vastaj kaj etendiĝis ekster la ekonomiko.
2. Same kiel en lia ekonomika verkado, ŝanĝo kaj evoluo estas en la fokuso (tamen ne koncerne la anatomian evoluon de la homo,

kiu estis nekonata).

3. Smith donas ekzemplon de diversaj metodoj laŭ la cirkonstancoj. La origino de la lingvo estas analizata ĉefe per dedukto el supozoj pri la homa konduto, dum lia analizo pri la diferenco inter lingvoj havas ankaŭ induktajn elementojn.

4. Same kiel en *Wealth of Nations* li pensas laŭ la modelo de tuta sistemo, kie diversaj aferoj dependas unu de la alia. (Ekzemple estas dependeco inter la morfologio kaj la sintakso de lingvo, tiel ke kompleksa sintakso kompensas malriĉan morfologion, kaj inverse.)

Tre facile vi interrete povas trovi kaj aĉeti la maldikan libron – nur 92 paĝoj. Krom la ĉapitro pri la lingvo de la homo oni ankaŭ spertas la vivon de Adam Smith – ekde la

infanaĝo ĝis la evoluo al filozofo. La skotan lernejan sistemon Adam Smith trovis sufiĉe bona, sed li kritikis, ke oni favoris malprofundan scion pri latino anstataŭ utilan bazon de la fakoj geometrio kaj mekaniko. Li mem, tamen, estis ravita de la klasikaj verkistoj. Kelkajn jarojn li vivis en Francio kaj en Svislando. Mi vere rekomendas al vi legi la libron!

Post la prelego ni kafumis kaj parolis iomete pri la venonta numero de Ora Ĵurnalo. Kiel kutime ni poste grupiĝis kaj havis lecionojn en tri grupoj. Ĉi tiun sabaton la vetero ne estis favora. Neĝis kaj malvarmis. Tamen venis 15 personoj. La Esperantosabatoj kutime okazas la unuan sabaton monate.

/ Siv

La prelego de Bo Sandelin legebla en www.esperanto-gbg.org.

Evert Svensson – vivo kun idealoj

La vojo de malriĉa dometo en Gråbo al UN kaj la granda mondo – pri tio Evert Svensson prelegis en Gråbo la 25an de januaro.

Kiam mi diris ke mi volus fari foton de li por la esperanta gazeto Ora Ĵurnalo, li miris – "Ĉu homoj ankoraŭ parolas esperanton en Svedio?" Li mem ne parolas esperanton.

Kiam Evert estis lernanto – unue en la baza lernejo en Stannum kaj poste en popolaltlernejo, oni ne instruis la anglan. Antaŭ lia internacia kariero, li mem devis lerni la anglan per studrondoj de ABF (la edukada asocio de laboristoj).

Fervora socialisto, li tamen ne malestimis la nesocialistojn, sed trovis, ke oni devas kunlabori. La pli gravaj politikaj aferoj por li estis: levi la vivnivelon de malriĉuloj, prizorgi la justecon kaj egalecon inter homoj. Kiam estis diskuto ĉu Svedio havu nuklearajn armilojn li debatis kontraŭ.

La rakonto de Evert ampleksas lian infanaĝon ĉe Stora Lövsjön, Gråbo, kune kun solpatrino, la junecon kiel kampula servisto en Vestrogotio, la engaĝiĝon en la Misifederacia kapelo kaj liajn 34 jarojn en la parlamento de

Svedio. Li estis la prezidanto de la Kristana Fratana Socialista movado.



Evert Svensson skribas dediĉon al mi en mia nov-aĉetita libro.

I.a. li laboris por atingi pacon inter Israelo kaj Palestino. Li renkontis multajn internacie konatajn homojn kiel Martin Luther King (bildo sur la kovrilo de la libro) kaj aliaj, kiuj dividis liajn ideojn.

Evert spertis tri svedajn socialistajn ĉefministrojn – Tage Erlander, Olof Palme kaj

Ingvar Carlsson. La plej terura okazaĵo dum lia kariero estis kiam li eksciis ke Palme estis murdita.

Svensson fariĝis delegito por UN, partoprenis en la Konferenco por Sekureco kaj en la Eŭropa Koncilantaro. Dum 12 jaroj li estis ano de la kunlabora organizo inter parlamentaranoj en Eŭropa kaj la Arabaj landoj.

Dum sia prelego Evert revenis al la frazo: "elektita de la popolo kun konfido". Li neniam havis fierecon, sed laboris por siaj idealoj.

La libro ampleksas preskaŭ 400 paĝojn kaj fotojn. Ĉu vi interesiĝas pri politiko, historio, loka geografio, sociaj aferoj kaj homaj rajtoj – aĉetu la libron kaj samtempe ricevu interesan konon pri prospera persono, gvidata de siaj idealoj. La eldonejo estas Votum & Gullers förlag.

Mi loĝas en Gråbo ekde 1971 kaj mi memoras la ruĝfarbitan dometon ĉe St. Lövsjön. Evert rakontis ke la dometo vintre estis tre

malvarma. Kiam estis konstruita kokinejo apude, li kaj lia patrino pli bone loĝis tie kaj la kokoj translokiĝis en la dometon.

Antaŭ ol oni konstruis domon sur kampo, uzita kiel parkejo, oni ĉiun jaron prezentis teatraĵon pri la homoj kiu loĝis apud la lago kaj ankaŭ Evert aktoris, eĉ se li ne plu loĝas en Gråbo. La baza lernejo de Stannum, en kiu Evert estis lernanto, estas nun ordinara privata domo. Ĝi situas tre proksime al nia nuna esperanto-biblioteko. / Siv



Jen la kovrilo de la ĵus eldonita libro "Mia nomo estas Evert, elektita de la popolo kun konfido". Evert renkontis Martin Luther King, kun kiu li dividis multajn ideojn.

Anekdotoj

ETA MISKOMPRENO. – La kuracisto (donante recepton al maljunulino kiu suferas de artrito): "Jen rimedo. Frotu vin per tiu trifoje tage dum tri tagoj."

La sekvan tagon la maljunulino revenas kaj petas novan recepton.

La kuracisto: "Sed tiu, kiun mi donis hieraŭ, devus sufiĉi por tri tagoj."

La maljunulino (montrante la ĉifonitan paperon): "Ne, la papero estis tiel malforta, ke ĝi daŭris nur por kelkaj frotadoj."

KOMPRENIS LAŬVORTE. – La juĝisto (al la mortkondamnito): "Pro graco vi povas elekti kian ajn morton."

La mortkondamnito: "Plej bona juĝisto, tiam mi elektas tiun, kiun okazigas alta aĝo."

LAŬ LA ORDONO. – La unua kliento: "Unu porcion da fiŝo, kelnero!"

Alia kliento: "Havigu ankaŭ al mi fiŝon, sed ĝi devas esti freŝa!"

La kelnero (al la kuirejo): "Du porcioj da fiŝo – unu freŝa!"

BONHUMORE. –. Gotenburgano revenas hejmen malfrue en la nokto ne tre sobra. "Mia dio", la edzino plendas, "la horo jam estas je la dua! Ĉu vi ne hontas veni hejmen tiel malfrue?"

"Sed Linjo," la viro diras, "se mi estus restinta hejme la horo tamen estus tiel malfrua."



Det var bättre förr – eller?

Visst var det bättre förr,
posten lämnas vid vår dörr,
svagdricka från drickabil,
filbunke – ej blaskig fil
på frukostbord i gammal stil !
På söndag lyssna' vi till prästens ord
och släkten kom till dukat bord
och alla brukade sin jord.

Barn fick vara barn rätt länge,
men lärde sig att hjälpa till,
vispa grisblod, gå på fiskafänge,
snickra ho åt kulturen,
knyta skor åt minstingen,
plocka bär och svamp,
härddas för sin levnads kamp.

Trots tvätt- och diskmaskin,
matberedare samt kyl och frys,
säger vi med tragisk min:
vi hinner knappt med fredagsmys.
Vi orkar inte koppla av,
vi har för många krav
Hur kunde det förändras så,
vi kan det knappt förstå.

Men var och en sitt ödes smed
så tiden är nog ej ur led.

Pli bone en malnovaj tempoj – aŭ?

Ĉu logas vin tempo fogesita,
kiam portistoj liveris poŝt' ĉe pord',
kiam acida lakto, hejme farita,
staris sur matena tablo en ord',
kiam venis biero per kamion'
kaj dimanĉe laŭ tradicion'
post preĝeja vizito
la parencoj venis sen invito.

Infanoj longe restis infanoj,
sed lernis kunhelpi:
kirli porkosangon, fiŝkapti,
fari akvuĵon al porkido,
nodi ŝuojn al pli juna ido,
pluki fungojn kaj berojn
kaj sperte fari monaferojn.

Malgraŭ maŝinoj por lavado,
kuireja roboto, frostoŝranko,
ni tragike parolas pri manko
de tempo por interrilato
kaj homa kompato,
tro multe da postuloj!
Kiel la kondiĉoj ŝanĝiĝis tiel
mi komprenas neniel.

Sed ĉiu nun pli decidas pri sia sorto,
homo, ne familio, agas laŭ sia forto.


Pentraĵo kaj teksto: Siv Burell

El la biblioteko de Stannum

Lingvomanio, daŭrigo:

Lingvomanio,
proverboj kaj idiomoj
de 28 lingvoj en
Eŭropo. /2015
lingvo.info/.

Mi citas: "La projekto
lingvo.info celas
provizi informojn pri




lingvoj kaj subteni multlingvismon en la
Interreto. La projekto volas montri belecon,
esprimpovon kaj unikecon de lingvoj."

Ĉi-foje vi ne bezonas cerbumi kiel last-foje. Vi
certe estas laca post la multaj festotagoj. La
klarigo estas apud ĉiu proverbo.

11. Hispana: Kun mono la hundo dancas.	Per mono ĉio eblas.
12. Hungara: Tiel kontenta, kiel simio pri sia vosto.	Tre kontenta , iom freneza.
13. Irlanda: Se vi ne ŝatas la veteron, vi ne devos longe atendi ĝis ĝi ŝanĝiĝos!	La irlanda vetero estas tre ŝanĝiĝema kaj ne estas strange, se en unusama tago montriĝas ĉiuj kvar jarsezonoj.
14. Itala: Ŝteletu, iru malliberejen; ŝtelegu, karieru pri tio.	Grandegaj ŝteloj estas nepunataj aŭ instituciigataj.
15. Kroata: Dio unue al si kreis barbon.	Zorgu unue pri vi.
16. Latva: Tio ne estas mia porko nek mia kampo.	Tio ne estas mia problemo.
17. Litova: Ne diru "hop" antaŭ ol vi supersaltis la barilon.	Ne ĝoju tro frue.
18. Malta: Oni ne devas esti sola, eĉ en paradizo.	Homo ne estis kreita por esti sola.
19. Nederlanda: Esti trafata de la alo de muelilo.	Frenezigi.
20. Pola: Se la kaprineto ne saltintus, ĝia piedo ne rompiĝintus.	Prudento estas patrino de sekuro.

Vidu www.lingvo.info !

Lingvokompreno en Eŭropo



Multajn provojn oni faris por ke la 28 membroj en la Eŭropa Komunumo pli facile interparolu unu kun la alia. Ekster la grandaj kunsidoj plej ofte ja ne troviĝas interpretado.

EUROPANTO de la jaro 1996, kreita de Diego Marani, ĵurnalista, verkisto kaj interpretisto de la Eŭropa Ministra Konsilantaro en Bruselo. Europanto estas bazita sur vortoj de la germana, angla, latina, franca, itala, nederlanda kaj hispana.

Jen ekzemploj:

"Europanto want nicht informe aber amuse. Porqué betanke aan die illuminante forza van eine laugh, sometimes man remarque things dat anders el hadde noticed nicht. Laugh esse directe emanatione des intelligence, Aristotele dixit. In der Europa des future, Europanto coudde mucho helpful esse por manige mensen inderfacts. After Euro bezale, wat more coherente dann Europanto speake?"

— Diego Marani, DE EUROPANTO BRICOPOLITIK :
Europantodag

Tips från Inga

Det finns ett "hittepåspråk" som heter Gavaro.

Här följer två fraser:

- Grut! (Saluton!)
- Ĉukompras? (Ĉu vi komprenas?)

El Wilt, novelo de Tom Sharpe.

"Always que Henry Wilt took der dog a passeggi, o, per esse piu precise, when il cane took him fora, o, per esse més precise, when Mrs Wilt falaba que they should raus gehen, damit ella could do i sui exercicis de loga, Henry toujours followed la mesma route. In fact, le Hund seguía the route und Wilt seguía le chien."

La koncepto estas ke ne troviĝas fikcitaj reguloj – nur kelkaj proponoj. Tio signifas, ke iu ajn povas tuj paroli Europanto:n, sed la parolanto havu respondecon teni al jam akceptitaj ordinaraj vortoj kaj gramatiko por la komunikado. Marani regule skribis gazetan kolumnon pri la lingvo kaj verkis novelon uzante la lingvon. Ek de 2005 li ne plu



promocias ĝin.

Mia komento: Ĉu eblas havi lingvon sen gramatikaj reguloj? Por kompreni Europanton mi ja devas regi **sep** lingvojn. La plej interesa pri Europanto estas ke oni sentas la bezonon de komuna dua lingvo.

/ Siv



Skaparen heter Manuel Havelik eller Kamiel Vanhulle: https://eo.wikipedia.org/wiki/Manuel_Havelik

Han dog 2016 men hann även skapa två andra språk:

Popido: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Popido>

Arcaicam Esperantom:
https://eo.wikipedia.org/wiki/Arcaicam_Esperantom

Aktuell person – George Soros



"I'm not doing my philanthropic work, out of any kind of guilt, or any need to create good public relations. I'm doing it because I can afford to do it, and I believe in it."

(https://en.wikiquote.org/wiki/George_Soros)

Inga Johansson fördjupar här våra kunskaper om George Soros och hans far. Hon berättar:

"Sveriges Radio P1 – Konflikt – hade lördagen den 27 januari ett program om George Soros. Programmet varade i 56 minuter. I början säger man att inte så många svenskar vet så mycket om George Soros. Man lyckas heller inte gräva så djupt att man hittat fram till hans barndom och hans far Theodor Schwarz"

Detta är text på esperanto från Wikipedia:

Teodoro ŜVARC (aŭ **SCHWARTZ** aŭ **SOROS Tivadar**; naskiĝis en 1894, mortis la 22-an de februaro 1968 en Novjorko) estis hungara juda esperantisto, doktoro kaj advokato.

Li verkis ankaŭ sub la pseŭdonimo Teo Melas (melas en la greka egalas al schwarz en la germana – nigra). En 1922 li fondis la revuon Literatura Mondo kaj redaktis ĝin ĝis 1924. Siajn rememorojn pri la unua mondmilito li resumis en facilstila romaneto Modernaj Robinzonoj eldonita

poparte en la revuo en 1923 kaj reeldonita libroforme en 1999 ĉe Bero (sekve aperinta ankaŭ en kelkaj nacilingvaj tradukoj).

Lia vivo estis eksterordinare plena, parte danke al la lingvo de Zamenhof. Teodoro Ŝvarc verkis la memuaron Maskerado ĉirkaŭ la morto pri siaj travivaĵoj en Budapeŝto dum la nazia okupo (nova eldono sub la redakto de Humphrey R. Tonkin, kun abundaj notoj paralelaj iasence al la verko de Nina Langlet aperanta preskaŭ samtempe). Tiu ĉi verko estis lastatempe eldonita en la angla en Britio (2000) kaj Usono (2001), kaj estas nun aperinta ankaŭ en la rusa, germana (2003), turka kaj hungara (2002).

Soros trovis Esperanton frue - sur la orientaj batalkampoj dum la Unua mondmilito, kie lia instruisto estis soldata kamarado Pal Balkanyi.

Post jaroj da militkaptiteco en Siberio, Soros eskapis el sia kaptejo; survoje hejmen en Moskvo li ludis rolon en la fondiĝo de la unua soveta Esperanto-asocio, kaj poste en Budapeŝto kun siaj amikoj Kalocsay kaj Baghy lanĉis la revuon Literatura Mondo. Lia filo, la financisto George Soros diris, ke la tuta aventuroplena vivo de lia patro ĝis tiu punkto, kiam venis la nazioj al Budapeŝto, estis nur prepariĝo por la plej granda defio de la vivo, la lukto kontraŭ la naziisma invado. Tiu momento estis, laŭ la filo, "la plej granda tempo de mia patro", kiam la tuta spertaro, la tuta lertaro, akirita tra dekoj da jaroj, ricevis sian plej grandan elprovon, kaj triumfis.

Vidare ŝager Inga: "På svenska i Wikipedia finns ingen beskrivning, men i den korta redogörelsen på engelska hittar man denna notering:

The family changed its name in 1936 from Schwartz to Soros, in response to growing anti-semitism with the rise of Fascism. Den äldre brodern Paul nämns inte heller i programmet. Han har skrivit förord till den engelska utgåvan Crusoes in Siberia (Modernaj Robinzonoj)."

Rubekolo, apoganto de Jesuo



(*Erithacus rubecula*)

Se vi estas en iu proksima arbaro kaj prefere en piceoarbaro kaj aŭdas birdopepadon, kiu memorigas pri printempa rivereto kiu kirlas, aŭ pri la ludo de vento en la foliaro, tiam estas la rubekolo proksime.

Rubekolo estas malgranda kaj ronda birdo. Ĝi vivas sur la grundo. La birdo estas brunkolora sur la supra flanko kaj hela sur la suba flanko kun ruĝoranĝa brusto kaj vizaĝo.

La precipa manĝaĵo estas insektoj, sed ĝi ankaŭ vizitas birdotablojn. La nestoj estas el musko kaj situas sur la grundo aŭ en arbostumpoj aŭ sub arboradikoj.

Rubekolo estas unu el la plej kutimaj birdoj kaj troviĝas en tuta Svedio krom en la altmontaro. Dum septembro–oktobro la rubekolo flugas al la okcidenta Europo kaj

revenas en marto–aprilo. Unuopaj birdoj travintras en suda Svedio.

Legendo pri la malgranda rubekolo

La sinjoro de la kreitaĵoj kreis la rubekolon griza. La birdo demandis al la Sinjoro kial. La Sinjoro respondis "Mi donis la nomon Rubekolo kaj Rubekolo estu via nomo, sed vi devas mem labori por meriti la ruĝan koloron". La Sinjoro postlasis la birdon, kiu flugis en la mondon.

Estas la unua Sankta vendredo kaj la birdo estas en Jerusalemo en la tago de krucumado de Jesuo. La birdo vidas kiel Jesuo suferas sur la kruco. Sur la kapo li havas dornan kronon.

Malgraŭ ke mi estas malgranda kaj malforta, ĝi pensas ke ĝi devas fari ion por la povra Jesuo. Li decidas sin kaj flugas al la kruco malgraŭ ke li estas timema, malgranda birdo. Kiam li flugas proksimen, li vidas ke dorno trapikis la frunton de Jesuo. Ĝi kuraĝigis sin, proksimiĝas kaj elprenas la dornon.

Subite sangoguto fluas de la frunto de Jesuo. La brusto de birdo estas nun ruĝa. Jesuo parolas al la birdo: "Pro via kompato vi gajnis ĝin, la nomon kiun vi portas."

Kiam li venis al la nesto liaj idoj kriis al li: "Via brusto estas ruĝa, via brusto estas ruĝa..." Nur unu sangoguto sufiĉis... post tiu okazo, la brusto de rubekolo estas ruĝa...! /Ingegerd

KRESKO



Kerstin Rhodin sciigis nin ke nova monata informilo "Kresko" aperis en decembro 2017. Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), Jarunska 6, 10000 Zagreb, eldonis ĝin. Kresko estas libere distribuebla, kopiebla kaj citebla – same kiel Ora Ĵurnalo. Bonege!

Retadreso de la redakcio:
zagreba.esperantisto@gmail.com

"Karaj legantoj,

jen la 2-a numero de Kresko, iomete pli ampleksa.

Ĝuu la legadon.

J. Pleadin, redaktoro"

Multaj konsentas, ke Afriko estas la plej



perspektiva regiono por disvastigo de Esperanto, aparte pro la juneco de sia loĝantaro. Averaĝa afrika esperantisto estas multe pli juna ol esperantistoj en Eŭropo. Konfirmas tion ankaŭ **Joel**

Muhire (sur la bildo), kiu estas nur 28-jara. Li estas instruisto de Esperanto kaj muzikisto, loĝanta en Rutshuru en Demokratia Respubliko Kongo, proksime al la limo kun Ugando [...]

En 2012 Joel ekokupiĝis pri muzikkomponado. Pro malbonaj sekurecaj kondiĉoj en Rutshuru, li portempe fuĝis al

Ugando, kie li komponis la kanton *Al nia lingvo*, uzante la versojn de Julio Baghy. Ĉiujn postajn kantojn li komponis post la reveno al DR Kongo en 2014. Tiujare li organizis propagandcelan dissendon tra la *Radio Alliance FM* kaj aktive propagandis Esperanton en la orfa lernejo *Njiwa*, kio ne estis facila tasko. En marto 2017 li proprarimede efektivigis sian malnovan revon kaj eldonis dekpecan muzikan albumon *Esperanto, ilo de paco*, per kiu li pruvis al lokuloj, ke Esperanto belsonas kaj uzeblas en ĉiuj kampoj, inkluzive por kantado. [...]

La unua serio de la muzika albumo *Esperanto, ilo de paco* elĉerpiĝis, sed Joel volus eldoni novan serion, krome ankaŭ sekvajn albumojn, sed liaj financaj rimedoj estas nesufiĉaj. Bonvolu aŭskulti liajn kantojn ĉe: www.senopone.wordpress.com/albumo. Ankaŭ en jutubo aŭskulteblas *Al nia lingvo*. Se vi ŝatas la kantadon de tiu vigla afrika kantgrupo, helpu al Joel Muhire per financa subteno al lia konto *jmhr-a* ĉe UEA kaj kontaktu kun li: Joel Muhire Po Box 08 Ug, Bunagana-Kisoro, Ugando. Retadrese: joelmuhire0@gmail.com.

Augustin Kakoza

Ankaŭ Augustin loĝas en Demokratia Respubliko Kongo. Sen salajro li instruas Esperanton al orfoj. El la biblioteko de Stannum ni sendis kelkajn lernolibrojn al liaj gelernantoj kaj Leif Nordenstorm sendis el la Esperanto-Eldonejo en Upsalo aliajn lernolibrojn.

Tamen, la situacio en Kongo estas mizera. Augustin pensas ke li helpus al siaj samlandanoj pli bone, se li havus eblecon fariĝi kuracisto. Se mi bone komprenas lin, li komencis studi la pasintan aŭtunon, sed mankas al li monrimedo. Daŭre li instruas la orfojn. Li serĉas kaj serĉas fondusojn, el kiuj li povus havi apogon. Se vi povas helpi lin per mono aŭ havas bonan ideon bv. kontaktu lin! La retadreso estas: augukako@gmail.com

/ Siv



Augustin donas pliajn informojn:

Kiu mi estas?

Mi nomiĝas Augustin Kakoza

Mwendambali, Kongolandulo de la Respubliko Demokrata Kongo. Mi loĝas en Goma, sed mi naskiĝis en Kindu, urbo for de Goma urbo je 550 kilometroj. Tie mortis mia Patro, sed mi ne povis partopreni en lia enterigo, pro manko de rimedo. Oni devas veturi aviadile, ĉar ne estas stratoj en nia lando por veturi. Mi estas studento en

medecino, mi parolas la Francan, Esperanton kaj bone lernos Anglan se eblos.

Pri kio mi laboras?

Lerninte la Esperantan lingvon dum 14 jaroj en Goma, mi ekinstruis ĝin al la infanaj georfoj. Fote vi malkovros ke mi instruas de 67 ĝis 70 georfojn.



Kion mi petas?

Al ĉiuj bonkoruloj, mi petas helpon por mi kaj por tiuj ĉi infanaj georfoj por plenumi gravajn bezonojn niajn. Ĉar pro malordoj kaj ĉiutagaj militoj, plimultigas georfoj pro la mortigo de iliaj gepatroj.



Intervjuo kun Martin Strid

Intervjuo kun Martin Strid en decembro 2017. Ingegerd Granat faris la demandojn.



Ingegerd: Kiel vi rigardas esperanton kiel packreanton en la mondo?

Martin: Pacon kreas ne lingvo sed homoj. Lingvo estas ilo por kompreni unu la alian. Interkompreno helpas sed ne sufiĉas. Internaj militoj, kie ambaŭ flankoj parolas saman lingvon, ja povas ankaŭ esti teruraj. Estas freŝaj ekzemploj pri tio. Pacon krei povas homaranismo helpi, kondiĉe ke ĝi ne estu

naiva. Oni komprenu la tutan amplekson de defio kiun oni alfrontas. Nek Zamenhof nek Gandhi nek Mandela estis naivaj, tial ili kapablis ion gravan atingi. Bezonataj estas firma volo kaj (eble svedisme) malfermaj okuloj.

Infanaĝe mi vivis en "eks"-koloniaj landoj en orienta Afriko kaj vidis je proksima distanco ne nur rasismon kaj subpremadon, sed ankaŭ lingvan kaj kulturan genocidon kontraŭ afrikaj popoloj. Ĝuste tial mi fariĝis esperantisto. Al multaj konatoj miaj mi tiujn spertojn jam rakontis, ĝi estas ŝattemo mia.

Ĉe malmultaj esoj [esperantistoj] hodiaŭaj mi rimarkas vere fortan volon plibonigi la mondon per fakte agi por tio, politike kaj sinofere. Facilas poezie kanti, revii kaj sidigi sin mem en la angulon de la plejbonuloj. Sed oni tiel neniom atingas en realo.

Ingegerd: Ĉu la lingvo povas senpintigi konfliktojn kaj krei interkonsenton?

Martin: Jes, ĝi povas, se oni scias uzi ĝin saĝe, kuraĝe kaj kun bona volo. Ni espoj ĉiuj scias ĝiajn avantaĝojn super aliaj lingvoj, tiujn mi espereble ne devas klarigi al vi.

Ingegerd: Ĉu vi apogas la rajtojn kaj egalajn valoroj de ĉiuj homoj ?

Martin: Jes. Estas ĝuste mia tutkora apogo al homaj rajtoj kiu igas min reagi kontraŭ tiu religio, kiu plej multe perfidas tiujn rajtojn. Ĝiaj anoj estas ĝiaj unuaj viktimoj. Mia familio ne permesas al mi diri pli, ĉar ne volas ke mi estu murdita. Jen kria kaŭzo tamen diri pli... Ho ve, ĉu mi viciĝas jam kun Mona Walter, Lars Vilks, Ayaan Hirsi Ali, Theo van Gogh k.m.a. – kia honoro (? :-).

Ingegerd: Ĉu eblus por vi havi gvidan pozicion en la esperanto-movado kaj superponti diversecon de opinioj?

Martin: La demando estas iom nebula. Pri kiaj diferencoj temas? Se du demokratiemaj homoj kverelaĉas pri detaletoj, mi volonte peras inter ili, al mi tiu rolo ne estas fremda. Mi kutimiĝis gvidi homojn al kaj tra demokratiaj proceduroj. Sed se temas pri tio ke ekzemple demokrato kaj faŝisto komprenu unu la alian, mi ne estus ĝusta peranto, mi tute ne kapablus resti neutrala inter tiaj aferoj.

Ingegerd: Kiel estis ke vi membriĝis en SD (sveda ultradekstra partio)

Martin: Mi respondos al tiu demando kaj rakontos pli ol tio: Min ĝenis kaj incitis la ada perfido de niaj parlamentaj partioj. En la centropartio (svede centern) mi membriĝis studanto kaj restis dum dek kvar jaroj, tre aktivis en kampanjo referendumo kontraŭ atomenergio kaj profesie laboris (kaj daŭre laboras) pri ekologia disvolvado de homa socio. La politikaj perfidoj kaj idiotismoj en tiu kampo, de diversaj registaroj, estas nenombreblaj. Kiam mia partio en eŭrop-uni-aniga referendumo subite troviĝis sur la

malbona laŭ mi flanko, mi ne plu eltenis membri. Post dek jaroj da politika senhejmeco mi aniĝis al la mediopartio (svede miljöpartiet), sed baldaŭ poste ankaŭ ĝi en membrereferendumo decidis opinii ke EU estas bona por nia lando, do mi denove malmembriĝis. Tiam mi havis nur du partiojn inter kiuj mi elektu por la nacia parlamento, la plej maldekstran kaj la plej dekstran. Tiu elekto ne estis alloga.

Dum infanaĝo mi havis kutimon starigi min inter batato kaj batanto, ĉar mi ne eltenis vidi ke oni persekutas malfortunon. Verŝajne tiu sento instigis min kiam mi observis kiel amasmedioj kaj politikaj establoj traktas la novan partion SD. Mi tralegis ilian principan programon kaj surpriziĝis ke ĝi estas multe pli bona ol mi atendis. Ek de mia tempo en Centra partio mi sciis ke tio, kio partio estas, kaj tio, kion gazetoj skribas pri ĝi, estas du malsamaj aferoj. Do, por esplori verecon, mi devus membriĝi mem. Kaj tion mi faris antaŭ tri jaroj. Mi ankaŭ pensis ke eble mi povas aldoni ion utilan al tiu partio, ĉar kelkajn mankojn mi ja vidis en ilia programo.

Antaŭ du jaroj mi unuafoje partoprenis lokan kunvenon de SD. Ĝi aspektis al mi iom fremda, mi tuj rimarkis ke estas tute alia "kulturo" ol en la Centra partio kiun mi ja konis, sed renkontis kelkajn homojn kun kiuj mi povis iom bone diskuti pri aferoj.

Kelkajn monatojn poste, en la loka jarkunveno, partoprenis eble trideko da homoj. Prezidis la kunvenon iu aliprovincano alsendita de la nacia organizo. Sed kio plej ĝenis min estis la etoso. Mi miris, ĉu mi troviĝas en Svedujo aŭ en iu diktatura lando. Estraro reelektiĝis, alternativa propono forfalis, kvazaŭ neniu kuraĝis protesti. Kaj mi nenion konis kaj nenion sciis.

Dum kunvenoj lastjare mi amikiĝis kun kelkaj membroj, novaj kaj malnovaj. Iom post iom, per ilia helpo, mi komprenis la situacion. La loka prezidantino – kies edzo ankaŭ postenis en sama estraro – gvidis la asocion, ne kapablis agi politike sed tenis siajn (multajn) postenojn pro la honorarioj. Je distrikta

nivelo estis simile, kaj tiuj du prezidantinoj sidis unu en la elekta komisiono de la alia. Kiu ajn membro, kiu volis agi politike aŭ por disvolvi la partion ekzigis, tiun ili eltrovis iujn kaŭzojn raporti al la nacia primembra komitato, kies tasko estas ekzigi malbonajn membrojn.

Antaŭ jaro amiko T, ankaŭ nova membro, iniciatis kampanjon por referendumo pri planata islama centro en nia urbo. En tiu tempo mi ne sciis multe pli pri islamo ol homoj ĝenerale kaj pli interesigis pri aliaj politikaj aferoj, ĉefe daŭripova evoluo kaj pli profunda demokratio. Tamen mi partoprenis. Sed baldaŭ dum la kampanjo mi komprenis kion vere signifas tiu ideologio, ke ĝi estas speco de faŝismo kaj ke miaj politikaj celoj ne havos sencon se ĝi superregos demokration. Ju pli da faktoj mi lernis pri tiu religio, des pli mi timis. Bedaŭris mi ankaŭ ke tiom da homoj eĉ ne volas aŭskulti, eĉ ne volas scii pri kio vere temas. Ĉirkaŭ tiu tempo mi ekhavis ankaŭ novajn amikojn ĵus fuĝintajn el Sirio. Kion ili rakontis pri islamo, el propraj spertoj, estis eĉ pli timiga. Nu, sed mi deflankiĝas de la fadeno demanda. (Legu prefere faktolibron svede "Islam under slöjan", senpage per interreto). Tiu nova amiko T kiu iniciatis la kampanjon per tio fariĝis minaco al la loka estraro, kiu krome sukcesis kredigi al la reprezentantoj de nacia estraro ke li estas malbonulo. Sed ni estis jam granda grupo da membroj kiuj ne volis plu havi "nordkoreujan" situacion en la asocio. Do, preparante nin por la estonta jarkunveno, ni (aŭ iuj el ni, mi fakte eĉ ne tute scias precize kiuj) kolektis pruvilojn pri niaj misestraranoj, precipe ke laŭ suspektoj ili simpatiis kun naziismo. (Preterpase, mi menciis ke la duonon de la parencaro de T murdis Hitlero).

Nelonge antaŭ nia ĉi-jara jarkunveno ekmembriĝis kaj T kaj la "geprezidantoj", sed la distrikta restis. Kiel planite, mi elektiĝis prezidanto de la jarkunveno, ĉiuj novaj estraranoj estis niaj kandidatoj, la tuta membraro unuanime tiel voĉdonis, la distrikta prezidantino (elekta komisiono) kaj nacia reprezentanto ŝokiĝis kaj malaperis tuj

post la kunsido. Monaton poste iom simile okazis en la distrikta jarkunsido, sed la naciaj reprezentantoj estis pli bonhumoraj.

Sed mi tiam jam sciis ke en eksmembra proceduro ne ekzistas justo, oni verŝajne eĉ ne legas la defendan leteron de la eksigoto kaj membroj estas rigardataj kiel konsumvaroj. Mi plurfoje parolis kun T poste, kvankam aliaj partianoj rigardis lin pario. Tuj post sia ekzigado li ekplanis fondi novan partion. Konstatis mi ke mi ne scias ĝis kiam mi eltenos resti en SD kaj iom konsilis al li pri tiu nova partio. Baldaŭ li lanĉos ĝin, kaj mi apogos.

Resume miaj tri jaroj en SD, precipe la lastaj du, estis tre interesaj kaj lernigaj. Kiam dum junaĝo en diktaturaj landoj mi vivis mi konsciis ĉiam pri korupteco kaj potencolukto. Nun mi vidis ĝin je proksimo, sed ĉifoje estis agrable ke kvankam mi partoprenis en la lukto, mia vivo neniam estis pro tio en danĝero. Kian ŝancon! Krome, ni sukcesis ekzigi nazisimpatiantojn el tiu partio. Kaj kuraĝige, en la nacia partikongreso en Norrköping, mi renkontis membrojn kiuj estis kaj saĝaj kaj simpatiaj. Do, kvankam restas kelkaj malbonuloj en SD, mi ne malesperas pri ĝi.

Ingegerd: Kiel vi rigardas la partian programon de SD kontraŭ pozitivaj, globaj kontaktoj?

Martin: SD ne havas partian programon. Ĝi havas principan programon kaj diverstemajn "direktiĝajn" programojn.

Ekde dekelkjara aĝo mi sopiris politikan planon por Afriko tian ke ĉiu popolo regu sin mem en sia propra lando per sia propra lingvo, sen honti sian afrikan kulturon. Tia situacio preskaŭ nenie ekzistas. Same neniu sveda politika partio komprenas ke longedaŭra "eks"-kolonia genocido detruas la naciojn afrikajn. La aferon provis mi priskribi en blogero
<http://www.ipernity.com/blog/62038/402275>.

Mi laboris en centra oficejo de SIDA, la tiel nomata disvolvhelpa agentejo de Svedujo. Tie mi parolis pri la detruado de afrikaj identecoj kun homoj kiuj multjare aktivis en Afriko, sed ili eĉ ne komprenis pri kio mi parolas. Nur unu kunordiganto de volontula organizoj jesis miajn observojn. Lu iama ĉefo de la urbdisolva departamento de SIDA malkaŝe kaj naive diris al mi ke certe estos pli bone kiam ĉiuj afrikanoj parolos nur la anglan. Ŝokiĝis mi tiom ke mi ne trovis vorton por respondi al li.

Nur en la principa programo de SD mi trovis tiajn vortojn per kiuj eblus argumenti mian pozicion. Tio estis por mi mia plej forta argumento resti en SD.

Ingegerd: Ĉu vi kredas ke ni en la esperantomondo povus krei bonan konversacian tonon malgraŭ la malsimilaĵoj inter ni. Ekz. politikaj tendencoj kaj opiniaj diferencoj, religiaj kaj vivmanieraj malsimilecoj.

Martin: Mi opinias ke tiu situacio jam ekzistas, estas fakta realo. Bedaŭrinde kelkaj homoj, precipe kiuj volas rigardi sin mem "progresemaĵoj" aŭ "radikalaj", laŭ iu modo politika, tre facile kondamnas aliajn homojn sen kompreni ilin. Mi jam vidis tion post mia mondfama misdiro, kaj trompiĝis je kelkaj homoj kiuj tuj ekkuris kun la granda. En ĉi tia situacio oni ekscias kiuj estas la veraj amikoj. Kaj mi bonŝancas ĉar ili estas multaj.

Idealismo estas necesa ingrediento. Sed ne ĉia ajn idealismo. Por esti saĝa ĝi spiciĝu per

sindona moralo de Jesuo kaj mensa trankvilo de Budho. En Esperantujo oni renkontas homojn kiuj estas ĝisoste demokratoj kaj edukiĝis en liberaj landoj. Kaj aliajn homojn kiuj eĉ ne scias la signifon de la vorto demokratio kaj kiuj edukiĝis en totalisma lando. Kaj ofte tamen tiuj du ambaŭ estas simpatiaj homoj kaj povas tre amike rilati inter si. Sed kial mi rakontas tion al vi? Certe vi jam scias.

Ingegerd: Ĉu la esperantomovado estas pardonema kaj batalas por homaj rajtoj, laŭ vi?

Martin: Ĝenerale jes, eble, sed diversgrade ĉe diversaj homoj. Kaj la agadon de nia movado en kelkaj landoj tro limigas registaro.

Ingegerd: Ĉu estas permesita erari vidinte per la "okuloj de la esperanta movado"?

Martin: Espereble jes, sub la normalaj kondiĉoj ke oni estu bonvola kaj ke oni provu korekti siajn erarojn.

Jen fino. Se vin interesas, legu ankaŭ miajn respondojn svede en DT [Dalarnas Tidning] vendrede la unuan de decembro. Ili nur malmulton fortondis el miaj diroj (mi sendos la leteron mem al vi ankaŭ, por komparo).

Hodiaŭ mi ricevis ideon verki libron "La arto mondfamiĝi en kvin sekundoj".

Amike vin salutas

Martin Strid

Pliaj anekdotoj

EBLE TIO. – La novedzino: "Ĉu vi amos min tiel multe, kiam mi estos morta, kiel nun?"

La novedzo (fantazianta): "Ho pli, mia kara, multe pli!"

KOMPLEZE: – La edzo: "Ĉi tiun ŝinkon mi povus manĝi ĝismorte, Hanna!"

La edzino: "Nur manĝu plu, karuleto, tion vi bone povas permesi al vi!"





Folke Wedlin

TURE SVENTON I WARSZAWA

efter

Åke Holmbergs berömda böcker

Fortsättning från föregående nummer

7

Det roade Emanuel ofantligt, att privatdetektiv Sventon behandlade honom som en furste. Han kunde visserligen inte för sitt liv förstå varför, men å andra sidan, varför inte? Det skulle säkert underlätta för dem, unga och vilt främmande som de var, att få hjälp av den berömde detektiven. Ludvig fick nu förklara det oförklarliga som skett: att hans språk försvunnit.

Sventon blev inte det ringaste förvånad. Han, om någon, visste, att allting försvinner förr eller senare. I all synnerhet om det är fråga om något unikt och värdefullt. Ett språk som är ingens språk och därför allas språk – något sådant hade han aldrig varit med om förut. Lite udda verkade det ju, men intressant. "Beskriv omständigheterna!" sade han på sitt vanliga tidsbesparande och effektiva sätt och

drog till sig anteckningsblocket som låg till hands på skrivbordet.

Ludvig berättade om gymnasiet hemma i Warszawa, om sin fantastiska idé, om den lilla anteckningsboken, om sin födelsedag, om lektor Beautrompes försvinnande.

Sventon antecknade: "Försvunnet: språk – födelsedag – lektor". Födelsedagen strök han dock nästan direkt från listan. Ludvig beskrev på Sventons begäran lektorns utseende, och han berättade också att lektorn försvunnit med en annan man, en spenslig man som var klädd i mörk välpressad kostym.

"Cheviotkostym?" kom det som ett pistolskott från Sventon. "Välpressade byxor? Spetsiga skor? Totalt försvunnen?" "Ja, just det, det stämmer!" sade Ludvig lite förvånad. "Vesslan!" stönade Sventon. "Ständigt denna Vessla!" – "Wisla?" sade Ludvig lite förvånad. "Nej, Wisla finns kvar." – "Finns kvar? Inte försvunnen?" Sventon trodde inte sina öron.

Skulle Vilhelm (Ville) Vessla, världens halaste och farligaste förbrytare, för första gången under Sventons yrkeskarriär inte vara försvunnen? En dov känsla av besvikelse sipprade plötsligt fram hos detektiven. "Hur skulle Wisla ha kunnat försvinna? En hel flod kan väl ändå inte bara försvinna?" undrade nu Fania. Efter några ögonblicks förvirring klarades hela missförståndet upp, och man kunde fortsätta.

När de så, en bra stund senare, hade rätt ut hela sammanhanget, sade Sventon: "Jag får sätta igång med spaningarna så fort som möjligt. Redan idag får det bli! Ers Höghet? Mitt herrskap? Vad sägs om en sväng på mattan?"

Ungdomarna tittade storögt på varandra. Vad menade egentligen detektiven? Emanuel kastade en förstulen blick på golvet. Någon matta låg där inte, om inte det slitna linoleumgolvet var det som avsågs. "Dansa här?" tänkte han. "Planerar detektiven att uppföra något slags magisk indiandans här i rummet?" Hans tilltro till den berömda detektiven fick sig en rejäl knäck.

Sventon kände deras tvekan. "Ber om ursäkt – ni vet kanske inte. Jag har en flygande matta. Jag tänkte vi tar den; den rymmer oss allihop. Så är vi nere i Warszawa redan ikväll!"

8

"Fröken Jansson!" ropade Sventon ut till sin sekreterare, "Vi tar mattan! Vi åker direkt!" En kort stund efter dök fröken Jansson upp i dörröppningen, mödosamt släpande på den tunga mattan. Den spred en viss doft i rummet – av vad? En hemtrevlig doft av något husdjur, vad det nu kunde vara. "Jag ordnar kaffe till alla – det tar ingen tid alls", försäkrade detektivens trogna sekreterare, "och semlor finns – Rosa var här i förmiddags med nya." Rosa, Konditori Rosa, var det enda konditori i hela Stockholm som bakade semlor hela året runt, och det sventonska detektivkontoret var stadig kund. "Så bra! Vill fröken Jansson vara snäll och fylla temmelburken." (Han menade

semmelburken, den burk för semlor som han alltid hade med sig på resor. Saken var den, att Ture Sventon älskade semlor, och så läspade han en aning.) "Och glöm för all del inte att ta några själv också, om fröken vill ha!" Sventon visste vilken skatt han hade i sin sekreterare.

Man rullade ut mattan framför det stora fönstret i detektivens mottagningsrum och öppnade det. "Var så goda att ta plats", uppmanade Sventon ungdomarna. Alla slog sig ner på mattan. Sventon själv satte sig längst bak (om det nu finns fram och bak på en orientalisk matta), och han skulle just låta mattan flyga iväg, då fröken Jansson ropade: "Stopp! Alla måste ha halsdukar, det blir säkert kyligt!" Hon delade ut virkade halsdukar i olika glada färger, en till var och en av resällskapet. – "Så kommer de till användning", tänkte hon nöjt; hon hade själv virkat dem på de lediga stunder hon aldrig hade.

"Alla klara?" frågade Sventon, och då alla svarat ja, strök han med handen över mattans frans och sade: "Till Warszawa". Som lyft av osynliga händer höjde sig mattan från golvet och svävade ut över staden, högt ovanför Stockholms takåsar.

Det gick snabbt undan, och snart var man ute över Östersjön. Det var skönt att ha halsdukarna på, även om decembersolen faktiskt värmde en smula. Filtar hade man också – fröken Jansson hade naturligtvis tänkt på sådana. Efter en halvtimme dök Gotland upp vid horisonten, och man kunde ägna sig åt att räkna kyrktorn. Vem såg flest? Man hann aldrig riktigt kora någon vinnare, för det dök hela tiden upp nya torn. Så tog kyrktornen slut, och man var ute över internationellt vatten. Överallt syntes fartyg; de flesta hade segel och rörde sig majestätiskt över havsytan, men här och var syntes den svarta röken från en ångbåt. Alla var olika, och man försökte gissa nationaliteten innan man kommit så nära att man kunde se fartygets flagga. Kaffet värmde, och det smakade gott med en semla

eller två; man skrattade gott åt varandras gräddmustascher.

”Titta, en stad där borta!” ropade någon rätt som det var. Staden närmade sig (såvida det inte var mattan som kom närmre), och man kunde se tätt liggande tegeltak med glittrande vatten däremellan. ”Ett slott!” sade någon och pekade. ”Hör, de spelar!” Ja, faktiskt ljudet från slottstornet; det lät som en vacker psalm. Sventon, som hade kartan uppvikt framför sig, sade: ”Säkerligen Königsberg.” Ludvig, som i skolan nyligen läst om staden Königsbergs store son, filosofen Kant, kom på sig själv med att tänka: ”Ja, det säger rena förnuftet”, och han kunde inte låta bli att le åt vitsen. Men man skrattar inte åt sina egna skämt, det kände han, och knep därför ihop läpparna.

Men mattan flög fort, och det dröjde inte länge förrän den började sänka sig. Där blänkte floden Wisla i det sista dagsljuset, och plötsligt satt hela sällskapet mitt på Slottsplatsen i Warszawa. Felix fick snabbt tag i en hästdroska, och en kvart senare stod man framför ingången till familjens Zamenhofs hus med mattan, ”temmelburken”, som nu var tom, och allt sitt övriga bagage. Portvaksfrun gjorde stora ögon, när hon släppte in dem i trapphuset.

9

Påföljande måndag – klockan var ännu inte nio på förmiddagen – vandrade Ludvig som vanligt varje skoldagsmorgon iväg till Warszawas Andra Läroverk för Gossar. Men den här gången hade han sällskap med en person som helt klart inte var gymnasist; man skulle snarast gissa att hans ledsagare var skolvaktmästare. Som alla vaktmästare hade han vida blåbyxor, i vars ena ficka låg en enorm nyckelknippa fäst i en kedja, som i sin tur var fäst vid bältet. Vid närmare eftertanke kunde faktiskt vem som helst se, att det här var en noggrann, betrodd och vresig skolvaktmästare; han hade knivskarp profil och såg ut som en hök, om man kan tänka sig en hök med nyckelknippa. Vad inte vem som helst kunde se var, att vaktmästaren i sin

andra ficka hade en pistol, en fruktansvärd ryttarpistol från Trettioåriga krigets dagar. Om man har för vana att medföra ett sådant vapen, är det praktiskt, för att inte säga nödvändigt, att man har rymliga fickor. Och det hade som sagt skolvaktmästaren i fråga.

Medan de följde Ludvigs vanliga skolväg, berättade Ludvig lite om staden och pekade ut mer eller mindre kända byggnadsverk. Kungliga Slottet med sitt torn såg man på håll; det hade man ju sett redan kvällen förut. Här var ett monument över den eller den kompositören, där ett annat monument över den eller den konstnären. Snart kom man förbi Riksbanken och strax därpå till Polska Riksdagshuset. Just när de passerade Polska Riksdagen, hördes ett väldigt surr därinifrån, ja, surret eller oväsendet var hörbart på långt håll; det lät som ljudet från tiotusen ilska getingar. ”Man har tydligen redan börjat dagens debatt”, anmärkte Ludvig lugnt. Strax därpå gick man förbi en liten tidningskiosk; den liknade ett kinesiskt tempel, och på väggarna runt om satt löpsedlar. ”Dagens nyheter”, sade Ludvig och läste högt:

”Nord-Polens Nyheter: Regeringen totalt ODUGLIG. **Syd-Polens Senaste Nytt:** Oppositionen fullständigt OANSVARIG. **Polska Posten:** Landet på väg mot UNDERGÅNG.

– Det är de tre tidningar vi har här i landet”, förklarade han för sitt sällskap.

Skolvaktmästaren rynkade pannan och såg om möjligt ännu mera ut som en hök. ”Tycks vara stor kris på gång”, sade han. Men Ludvig svarade: ”Nej, det tror jag inte – inte mer än vanligt.”

Snart var man framme vid den stora borgliknande byggnad som var Ludvigs skola, och skolvaktmästaren sade: ”Här är det bäst att vi går in var för sig. Jag väntar här ett slag.” Och Ludvig, som såg sina vänner Max, Emil och Alexander stå i en grupp för sig själva på skolgården nickade och höjde handen kort som avskedshälsning till följeslagaren.

”Hur har det gått, Ludvig? Har du hittat din bok? Du ser gladare ut!” Vännerna var

sprängfyllda av nyfikenhet. "Jag har varit i Stockholm över helgen", sade Ludvig med ett hemlighetsfullt leende. "Stockholm?! Hur gick DET till?! FLÖG du, eller?! Vad gjorde du DÄR?!" Vännerna kunde ju inte tro annat än att Ludvig skämtade, men hur de än försökte, fick de inget annat besked ur honom. De förstod i alla fall att läget inte var helt förtvivlat längre.

Under tiden gick vaktmästare Sventon in i skolbyggnaden via en mindre ingång som såg ut att vara till för personalen. Han kom in i en korridor, som han följde. Han vek av runt ett hörn och tittade uppmärksamt åt båda sidor. Dörrar till höger, dörrar till vänster. "Hallå där", sade plötsligt en barsk röst bakom honom. "Vad är nu detta?" Sventon vände sig om, och den barske mannen fortsatte: "Jag är vikarie, och nyckeln jag har fått till salen passar inte. Kan ni hjälpa mig kanske. Ni är ju vaktmästare, eller hur?" Sventon svarade blixtnabbt: "Javisst! Får jag titta på nyckeln?"

– Det stämmer! Adjunkten har fått fel. Jag ska genast hämta rätt nyckel. Var god och vänta här!" Han kilade iväg och kom plötsligt till en dörr, där kostymklädda herrar med stärkkrage sprang ut och in som flitiga bin i en kupa. "Aha! Lärarrummet", tänkte Sventon. Han gick rätt in och sade till den första person han mötte: "Ursäkta – skolinspektörn – är han här?" – "Licentiaten Putorius?" fick han till svar. "Nej, så vitt jag vet har han rest tillbaka till S:t Petersburg; det här med lektor Beautrompe, ni vet – förfärligt..." Sventon tackade, men han gick inte ut. Han såg att det fanns en stor bokhylla i lärarrummet, och en grupp av böcker i hyllan verkade vara ett uppslagsverk. Utan att tveka gick han fram och letade upp ordet putorius. Han hittade: Putorius: vessla. Han lät boken sjunka och sade för sig själv: "Det var det jag visste. Ständigt denna Vessla!"

Följ den spännande fortsättningen i nästa nummer!



ŜTONO – TONDILO – SAKO

Memoru:

- La ŝtono venkas la tondilon, ĉar la ŝtono malakrigas la tondilon.
- La tondilo venkas la sakon, ĉar la tondilo povas distondi la sakon.
- La sako venkas la ŝtonon, ĉar la sako povas kaŝi la ŝtonon en si.

La dekstra mano malantaŭ la dorso.

Se vi elektas la ŝtonon – pugnigu la manon.

Se vi elektas la tondilon – montru la montran kaj la longan fingrojn.

Se vi elektas la sakon – ĉiuj fingroj estas etenditaj kaj sen interspaco.

Kalkulu: unu, du, tri kaj montru la manon!

Kiu venkis ĉi-foje?

Ĉu vi pensas – kiel mi – ke la ludo estas facila? Oni nur imitas la gvidanton, sed la instruado per vortoj estas malfacila, ĉu ne? /Siv

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68. La eldonfrekvenco estos neregula. Redaktantoj: Siv Burell, tel 070-721 34 79, siv.burell@gmail.com kaj Ingegerd Granat, tel 073-502 53 32, ingeGERD.granat@telia.com. Fina paĝarangô: Andreas Nordström, arendsian@hotmail.com.

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!